

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 penĉoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 penĉoj aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 Linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 38. Melburno (Melbourne), Australio. 10 Augusto, 1923.

HERE AND THERE.

The City Council of Genoa have decided to teach Esperanto in the evening schools under its control.

The first lady Doctor of Law in Czecho-Slovakia is an Esperantist. Miss Andela Kozakova, a member of the U.E.A., and of the Prague Esperanto Club.

The Department of External Affairs in Sweden is experimentally making use of Esperanto by the publication, in *La Informilo* (supplement of "Esperanto," Geneva), of information regarding Sweden, its trade and resources. By getting translations of these items inserted in the Australian press our readers will help to demonstrate the usefulness of Esperanto, and also show the Swedish authorities that their efforts to obtain wide publicity have been successful. Press cuttings should be sent to Sveda Esperanto-Federacio, Stockholm.

Owing to the initiative of Lieutenant Kaŭaŝima, an Esperanto group composed of crews of submarines has been formed. The members are attached to the Japanese submarines numbers 18, 21, 42, and 43, and to the 15th torpedo boat squadron in Makoo, Formosa, and Sasebo. At the latter port Lieut. Aŭaja, of the Air Forces, is an active advocate for Esperanto.

A meeting in the public hall of the Commercial Review, "Les Echos," (Paris), discussed Esperanto and Wire-

less Telephony. S-ro. E. Archdeacon, presided, and amongst those present were S-roj. Berthelet, member of the Academy of Science; Aulard, ex-professor of the Sorbonne; Esnault-Pelterie, aeroplane manufacturer; Baudet, member of the Chamber of Commerce, Paris; Gueritte, ex-president of the French Chamber of Commerce in London, and G. Chavet. The latter gave a lesson in Esperanto to the 200 persons attending the meeting.

For the seventh time S-ro Farges has organised and superintended the display of a propaganda exhibit during the Lyons International Fair. Many visitors applied for information.

INTERNATIONAL LABOUR OFFICE.

Bulletins have been issued dealing with the proposed modification of the U.S.A. Constitution, so as to enable legislative action to be taken to protect child labor; regarding hours of labor in Japan; a summary of the two volume report of the Fourth Conference (Oct.-Nov., 1922); concerning payment of wages during holidays; and Japan and the international labor conventions. Lack of space precludes publication in "La Suda Kruco," but the reports are at the disposal of any reader interested, or who would make effective use of them.

LA VENONTA KUNSIDO DE LA INTERNACIA LABORA KONFERENCO.

La Administra Konsilantaro de la Internacia Labora Oficejo, en ĝia kunsido okazinta en Genevo de la 10a al la 13a Aprilo, diskutis la daton de la venonta kunsido de la Internacia Labora Konferenco. Ĉiuj opiniis, ke kunvenas, pro praktikaj motivoj, ke la Konferenco kunvenu en la printempo anstataŭ Oktobro. Artikolo 389 de la Packontrakto postulas tamen ke la Konferenco, kunvenu almenaŭ unu fojon ĉiujare. Finfine, oni aprobis aranĝon okazigi kunsidon daŭrantan ne plu ol unu semajnon en Oktobro 1923, kaj kunsidon kun norma daŭro en la lasta duono de Junio 1924.

Sekve la Kvina Kunsido de la Internacia Labora Konferenco malfermos en Genevo, London, la 22-an de Oktobro 1923, kaj havos en ĝia tagordo nur unu demando, nome, "Generalaj principoj pri organizo de laborinspektado."

La Administra Konsilantaro ankaŭ decidis meti en la tagordon de la Konferenco en 1924 la demandon pri nokta laboro en bakejoj. Tiu estas tre grava demando, kaj postulas ekzamenon laŭ ĉiuj vidpunktoj, kun komparo de la ĉstanta leĝaro kaj la ekonomia situacio en diversaj landoj.

Oni ankaŭ decidis rememorigi la ŝtatmembrojn de la Internacia Labora Organizaĵo pri la devo, kiun Artikolo 405 de la Packontrakto metis sur ilin, proponi al iliaj kompetentaj aŭtoritatoj, por konfirmo, la projektojn de konvencioj balotitajn de la Internacia Labora Konferenco en la tempolimo de unu jaro, aŭ escepte 18 monatoj, post la fino de la kunsido de la Konferenco. (Informservo de la Internacia Labora Oficejo.)

PRI FOIROJ.

Lastatempe alvenis esperante presitajn dokumentojn pri foiro en Malmo. Svedujo (30 julio ĝis 5 aŭgusto): Leipzig Aŭtuna Foiro, (26 aŭg. ĝis 1 septembro) kaj Reichenberg Foiro (11 ĝis 19 aŭgusto). Per havigi rezultatojn ĉi tiuj informiloj devis esti en Aŭstralio antaŭ trimonatoj. Se la cirkuleroj ne malfermas necesajn rilatojn ne estos la kulpulo de Esperanto, sed tiu de la foirdirektantoj, kiuj ne ekspedas siajn cirkulerojn sufiĉe frue.

KRONIKO.

MELBURNO, V.—Ĉe la Temperance Hall, la Raciista Grupo Esperantista bonvenigis la ceterajn Melburnajn grupojn dum sociala vespero la 12an de julio. La sesdek samideanoj ĉeestantaj havis tre agrablan tempon, ĉu dancante, ĉu ludante, ĉu aŭskultante kantojn kaj muzikaĵojn, ĉu mangante la tre bongustan manĝaĵon. Dum intertempo, la Prezidanto, s-ro Skurrie, klarigis ke la kunveno estis kvazaŭ adiaŭna festo en honoro al s-ro Rutland, la energia kaj entuziasma sekretario de la grupo, kiu baldaŭ foriros por loĝi en Sidnejo. S-ro. Skurrie gratulis la multajn reprezentatojn de grupoj kunligitaj al la A.E.A. kaj eldiris la esperon, ke la sola granda grupo nun ekster la asocio ne por ĉiam restos ekstere. Antaŭ ol foriri multaj vizitantoj dankis la gasteman grupon.

MONT ALBERT, V.—Kelkaj Esperantistoj ĝuis la gastemecon de s-ino. Stein, ĉe ŝia ĉarma hejmo en Mont Albert. Forteplanaj solajoj de f-inoj. Blyth kaj Bell, violona solajo de f-ino. Dorothy Bell kaj kantoj de la gastiganto ravis la aŭdantaron. La okazo estis Amerikana Teo por la kaso de "La Suda Kruco," kiu per la vendado de donacoj gajnis £3/1/6.

SIDNEJO, N.S.K.—La Sidneja societo esperanta kunvenas ĉiun jaŭdon, ĉe Station House, Rawson-pl. La programo ĝis oktobro estas, kiel sekvas:—Aug. 16, Short Play, members; Aug. 23, "Learning a Language" (in English), Mr. J. N. Edmonds; Aug. 30, Esperanto Games, members; Sept. 6, "The Coming of the Fairies," Mrs. A. Scammell; Sept. 13, Short Stories, members; Sept. 20, "Propaganda," Mr. F. T. Simon; Sept. 27, "Esperanto in Practice," Mr. L. E. Fosto; Oct. 4, Musical and Recitation Evening, members; Oct. 11, Mock Trial, members; Oct. 18, "The English Lake District" (with lantern slides), Mr. F. V. Taylor; Oct. 25, "The Three Bears," Mr. G. H. Chappel.

La Sidneja Societo ĉiu semajne havas ion por interesigi membrojn kaj vizitantojn. La Prezidanto, S-ro. F. V. Taylor, bone sciante la kapablecojn de siaj anoj, presigis programon laŭ kiu la kunvenoj estas aranĝataj Dum Julio hispana samideano, S-ro M. Moran, lekcias pri "Miguel Cervantes", S-ro N. Grant paroladis pri la kon-

stelacio, membroj laŭvice deklamis mallongajn esperantajn poemojn (seriozajn kaj humorajn) kelkaj ludis muzikinstrumentojn kaj aliaj kantis aŭ rakontis ŝercojn. Tiu sistemo estas tre ŝatata de la membroj car ĝi donas bonan ŝancon aŭdi kaj paroli la karan lingvon.

Je la komenco de la monato unu el la junaj Svisanoj, pri kiu "La Suda Kruc" lastfoje raportis, vizitis la societon. Estis S-ro Bernardo Soppelsa, kiu envojaĝis Aŭstralion ne sciante la anglan lingvon, sed des pli bone parolas Esperanton. En mallonga parolado li kore dankis la societon por la bonegaj aranĝoj bonvenigi lin ĉe ŝipstacio kaj precipe menciis la afablecon de S-ro Pfahl kiu estas la U.E.A., Vic.-delegito. Por li ĝi estis vivanta ekzemplo de la potenco de Esperanto. Sidnejo tiel plaĉas al S-ro Soppelsa, ke li intencas loĝi tie ĉi.

Nova grupo, nomata "Teozofia Esperanto-Ligo," starigis inter teozofistoj sub gvidado de S-ro G. H. Chappel. Tiu rezultis el propaganda artikolo en fak-jurnalo kaj promesas bone sukcesi.

ESPERANTO KAJ PARLAMENTO DE NEDERLANDO.

En la provizora raporto de la parlamentaj raportantoj pri la instrubudĝeto 1923 estas skribite:

Unu el la parlamentanoj ankaŭ pledis por akcelo de la studado de la internacia lingvo Esperanto, kies graveco rilate la pacmovadon, sciencajn kongresojn kaj komercinterrilatojn estas pravigita de la Ligo de Nacioj. Le ministro povus liaopinie atentigi komunum- kaj lernejestrarojn pri la dezirindeco aranĝi kursojn en Esperanto.

En sia respondo al tiu provizora raporto la ministro de instruo diris:

La celado de la Esperantistoj meritas estimon. La registaro tial ne malzorgas regule reprezentigi sin en la internaciaj kongresoj por tiuj ĉi help-lingvo.

LI NE HAVIS GIN.

Bananolanda kuracisto al sia kunulo:—Mi tre eraris hodiaŭ matene. Mi operaciis sur malsanulo kaj li ne havis tion, kion mi supozis.—Ah—diris la kunulo—li ne havis apendiceton?—Ho jes.—respondis la kuracisto—li vere havis apendiceton, sed li ne havis monon.

JAPANAJ VIVREGULOJ. POR LA POPOLO.

La japana registaro lastatempe ordonis disvastigi per sennombraj flugfolioj regulojn por la portigado kaj sanigado popola, kiuj povas esti utilaj ankaŭ por aliaj nacioj.

Jen la Esperantigita teksto de la 10 reguloj:

1. Enlitiĝu fruvespere kaj levigu ĝustatempe en la mateno.

2. Kiel eble plej longan tempon de viaj liberaj horoj pasigu en la bela, freŝa naturo. Pripensu, ke la suno estas forta, tre efika sanigilo.

3. Movigu multe en la freŝa aero kaj tion farante spiru profunde kaj regule.

4. Dormu en malluma senbrua ĉambro; via dormo daŭru 6. maksimume 7 horojn. Knabinoj kaj virinoj bezonas iom pli longan dormon.

5. Unu tago de la semajno estu plena ripoztago. En tiu tago oni eĉ ne skribu aŭ legu.

6. Prenu malmulte da teo aŭ kafeo; evitu ankaŭ la ĝuon de tabako, opium-produktoj kaj alkoholaĵoj.

7. Estas konsilinde manĝi viandon nur unu fojon ĉiutage. Lakto kaj laktoproduktoj, fruktoj, legomoj, ovoj kaj farunaĵoj estas pli sanigaj kaj pli bonfartigaj.

8. Banu vin ĉiutage. Unu aŭ du fojojn ĉiusemajne estas konsilinda apliko de vaporbano; sed antaŭe lasu esplori vian koron, ĉu ĝi estas sufiĉe forta, por akcepti sensufere tiajn banojn.

9. Por viaj vestaĵoj preferu ŝtofojn krude teksitajn, kiajn oni uzas por la fabrikado de subvestoj. Uzu malpezan kapkovraĵon kaj precipe konformajn ŝuojn jam de la frua junaĝo.

10. Gardu vin kontraŭ emocioj. Ne senbridigu vian pasion. Ne ĉagreniĝu pro la estonteco, kiun vi ne konas antaŭe. Ne rakontu al viaj kunuloj malagrablajn okazaĵojn kaj ankaŭ ne aŭskultu tiajn.

(el Revuo de E.T. Trad. Mŭdjekeewis)

NEKROLOGO.

Post mallonga malsano mortis en Sidnejo, la 11 Julio 1923, malnova kaj estimita samideanino, Sinjorino Ida Mary Withers.

Ŝi estis unu el la plej malnovaj membroj de la Sidneja Esperanto-Societo—kiam ĝi ankoraŭ portis la nomon "Zamenhofa Klubo"—kaj ĉiam propagandis nian aferon inter la elektitaj medioj kiujn ŝi vizitadis. Multaj Aŭs-

tralianoj ankoraŭ memoras ŝian aktivan partoprenon en la Tria Kongreso (1920) kiel grupestrino de sukcesa fantazia kostumbalo en la urbdomo.

Krom vigla esperantistino ŝi fondigis la nun bone konatan "Bush Book Club" (Libro-prunta klubo por kamparanoj), estis honora sekretario de grava memvola ambulanco kaj por ŝia bonega servado dum la milito ricevis la ordenon de "Sankta Johano de Jerusalemo."

En ŝi ni perdas valoran membron kaj helpeman amikinin. Aŭstralaziaj esperantistoj funebras.

ZAMENHOF MONUMENT FUND.

Julio 25a estis gaja nokto por Melburnaj Esperantistoj. En la Aŭstralio ĉambrego, 19 Strato Russell, oni aŭdis longan kaj laŭtan ridon. Oni trovis ke ĉaradoj estis la plej bona maniero por amuzi amikojn. Krom la ridoj kaŭzitaj de la ĉaradoj tre bela muziko aŭdigis. La kunveno daŭris ĝis la dek unua. Inter la aŭdantaro estis gesamideanoj el Christmas Hills, Daylesford kaj Wedderburn.

La Monumenta Kaso gajnis £4 per la kunveno. La Aŭstralio donado al la kaso estas ĝis nun £30. Melburno kolektis tiun sumon. Ĉu la aliaj ĉefurboj ne povas fari ion similan? Rapidu!

ESPERANTISTOJ—

STENOGRAFISTOJ.

Kelkaj gekolegoj—esperantistoj kaj stenografistoj—formis provizoran Komitaton, por celi la kreon de internacia Asocio de esperantistoj stenografistoj.

Tiu Asocio laboros por propagandi Esperanton en la stenografistaro, kaj Stenografon en la esperantistaro.

Tiu Societo zorgos same por instrui la junajn kolegojn, kiuj volos stenografi la internacian lingvon; por prisicigi siajn membrojn pri la disvastigo de l'stenografo en la diversaj landoj; por la verkado de teknika vortaro; k.t.p.

La provizora komitato nun eldonas "Rondirantan Gazeton," atendante kiam la Societo estos fondita kaj iom forta, por eldoni pli gravan gazeton teknikan.

Kiu volas helpi la starigon de tiu Asocio—kies kotizo koston malkaŭdas—estas petata sin turni al la provizora sekretario: S-ro. P. Flageul, 9 Bui-

vardo, Voltaire, en Issy (Seine), Francujo.

THE SYDNEY CONGRESS GROUP.

Facing this page is a reproduction of a photograph of those visitors to the Congress who attended the Civic Reception at the Town Hall. The names are not given here, as they would occupy too much space, but those present at the Congress will have little difficulty in recognising themselves and the other samideanoj forming the group. The admirable block is the work of the Murray Fraser Process Engraving Establishment, Charlotte Street, Brisbane, and was generously presented to "La Suda Kruco" by Fraŭlino Marion Fraser, to whom very sincere thanks are hereby tendered.

FOURTH AUSTRALASIAN ESPERANTO CONGRESS, SYDNEY, N.S.W.

March 30th to April 5th, 1923.

The following is the audited statement of receipts and expenditure:

Receipts.

Subscriptions	£65 15 0
Ticket Sales, Concert	10 2 0
Donations	6 2 9
Refund, Catering	5 0 0
	£86 19 9

Expenditure.

Catering	£23 5 0
Printing	15 17 6
Postages	8 11 0
Rent	6 17 6
Advertising	5 14 6
Propaganda Expenses	3 3 0
Fares to Zoo	2 18 9
Expenses, Concert	2 18 9
Donated	2 16 0
Stationery, etc.	1 14 6
Telegrams	0 16 9
Newspapers and Reports	0 10 8
Sundries	0 5 0
Typing	0 4 0
Exchange Cheques	0 3 0
Part balance to Suda Kruco	6 1 0
Part balance Sydney Esperanto Society	5 2 10

£86 19 9

[I should like to take this opportunity of thanking, through the "Suda Kruco," those who supported the Congress, either by subscriptions or donations, and especially those who encouraged the organising committee to go on by subscribing early.—Frank V. Taylor, hon. Congress treasurer.]



Fourth Australasian Esperanto Congress, Civic Reception, Town Hall, Sydney.

Photo: Sidney Riley.

Block: Murray Fraser, Brisbane.

LA VERA MARSERPENTO.

Maljuna Sandy, de la Mary Jane, havis klare timigitan aspekton kiam li aligis al la dometo de la ŝipstaciestro, ĉe la pordo de kiu kolektiĝis la kutima nombro de fiŝkaptistoj, post la forsendo per la matena vagonaro al Melburno, de sia kaptitaĵo. Liaj amikoj estis deziregaj ekscii la kaŭzon de la nervaj tikoj de lia vizaĝo, kaj la malrigida agado de lia kutime sanema kaj forta figuro.

—He, Sandy, kio estas?—kriegis la sen-ceremonia Sam Belaye—Vi certe devas esti vidinta fantomon.

—Estas pli malbonaj objektoj ol fantomaj ĉirkaŭe; respondis la maljunulo per haltema voĉo,—ĉar fantomoj ne povas difekti vin. Sed mi vidis ion lastan nokton, kiu certe timigis min, kaj preskaŭ estis la mortigilo de mi. Mi serĉadas la marserponton de dud-ekkin jaroj, sed ĝis lasta nokto mi pensis ke tia monstro ne ekzistas.

—Ĉu vi diras al mi tion?—diris la ŝerca Tom Sheel—Nu tio estas plej eksterordinara. Mi estas aŭdinta pri personoj vidintaj serpentojn; sed marserpentoj! Mia vorto!* Li ridetis larĝe. —Certe mi estas prava—diris Sandy vizaŭte la gutojn de ŝvito de lia fronto kaj ĵetante malbonvolan rigardon al Tom.

—Ne estis drinkaĵo nek io simila en la ludo, kaj la tuta ŝipanaro vidis ĝin, kaj ili ne klinas forgesi ĝin ĝis ilia mortotago.

—Ĉi tiu estas novaĵo inda de rakonto,—diris maljuna Jack Trawl, maljunulo kiu havas kvar fortikojn filojn kiu regule ĉeestis la fiŝkaptejojn, kaj tiel sukcese ke la maljunulo detiris sin de aktiva partoprenado sed regule ĉeestis ĉiun kunvenon de la fiŝkaptistoj, kaj pro sia maraj rakontoj kaj sentencaj ekdiroj, estis nomata:—“La Aŭtoritato.” Li malleviĝis komforte sur benkon streĉis la krurojn, kaj forte frotis la manojn kune.

—Donu al ni la klaran veron, Sandy pri kiel la afero okazis, kaj ni havos taŭgan raporton skribita kaj ekspedita al la fiŝkaptada departemento.

—Ĉirkaŭ la dekdua lastan nokton,—daŭrigis la agitata fiŝkaptisto post li zorge ekbruligis lian pipon,—ni kuŝis ĉe niaj retoj 40 mejlojn nordokcidente de Flinders militŝipstacio. Ne estis tre mallume je la horo sed blanka nebulo kuŝis sur la akvo. —Ne estis vento, kaj la maro estis tiel trankvila kiel

lago. Subite la maro leviĝis ĉirkaŭ ni, kaj la Mary Jane komencis tremi kaj balanciĝi kvazaŭ ŝi estis ĵetonta ĉiujn anojn elŝipen kaj la snuregaro post ni. Jen Peter estis dispeciganta la retojn, kaj li eksaltis pensante ke ni estis en kolizio. Ĉu ne Peter?—ame metante la manon sur la ŝultron de sia plej maljuna filo.

La junulo malrapideme demovis duoncilon da cigaredo kiu estis klininta de liaj lipoj, kapjesis kaj diris—Jé-es, —tiam aperigis batitan pakajeton da cigaredoj, kaj kun multe da pripenso elektis ankoraŭ unu fumajon. Post ĉi tiu konfirmo Sandy daŭrigis:—

—Tial vi povas scii ke ĝi estis sufiĉe malbona. Tiam estis terura bruego de io kureganta tra la akvo, kaj pli-laŭtiganta, ĝis granda, longa, pretermonda besto iris siblante preter nia flanko kiel grasmuita fulmo, kaj estis el de vidlimo antaŭ ol ni havis tempon por palpebrumi.

—Ah! estis baleno, nenio pli aŭ malpli—ekdiris Ben Jonson, la serioza kaj silentema maristo, formordante la angulon de peco da tabako, kaj kraĉante sur la marboto de Sandy

—Ne; supozante ke estis amaso da balenoj, ĝi ne povus igi mian boaton danci tiamaniere—respondis la fiŝkaptisto,—kaj krom tio, mi estas vidinta kelkajn balenojn dum mia vivo ĉe Grenlando, kaj la Pacifiko, sed mi neniam vidis ilin kun du brulaj rugaj okuloj kiel havis tiu, ĝi nepre estis la marserpento, kaj tio estas ĉio pri ĝi. Kvin minutojn post ĝi preterpasis, la akvo estis tiel trankvila kiel la haveno estas ĵus nun, kaj la Mary Jane kuŝis senmove.

—Ĉu estis iom da aliaj boatoj apud vi je la horo? demandis la Aŭtoritato —Ni devas venigi tiom da atestaĵo kiom ni povas akiri pri tia grava afero kiel ĉi tiu.

—Estis nun grava vidanto, sed li estas mortinta—respondis Sandy. La malkredema aŭskultantaro ŝanĝis sian pozon aŭdinte ĉi tiun deklaron, kaj ilia konduto fariĝis subite estimplena kaj modela.—Sed ne estas tre grave —daŭrigis la fiŝkaptisto,—li ne povas doni al vi multe da sciigo, ne konante la lingvon. Estas ja mistera afero. Kiam taglumo venis, Peter trovis grandan fiŝon salttrapantan en la boato. La marserpento faris penon por kapti lin, kaj li saltis sur la Mary Jane por esti el danĝero. Li sangis ĉe la nazo; tial Peter donis al li unuan

helpon. Estis afabla bonintenco ago de Peter, sed la fiŝo ne postvivis ĝin. Ĝi kurbigis la naĝilojn kaj forlasis ĉi tiun vivon ĉirkaŭ horo antaŭ ol ni alvenis hejmen, ne lasinte ian deklaron por konfirmi miajn historieton pri la marserpento. Sendube estis timo kio mortigis ĝin, kaj esti honeste kun vi, knaboj, mi mem sentas min malproksima de sana.

—Estas sufiĉe vere pri la fiŝa parto de la historio—diris Fred Carter, kiu ĵus revenis sur sia ŝarĝveturilo, liverinte la kestojn da fiŝoj ĉe la fervojostacio.—Mi vidis la fiŝon: certe ĝi estis bonulo.

—La ŝipstacieŝtro vagis sur la scenon, alproksimigante sian malgrandan oficejon. Pasantre tra la malgranda aro de maristoj lia kapo estis mallevigita kaj liaj okuloj estis fiksataj sur la matena ĵurnalo.

—La ĝusta viro kiun mi serĉis diris la Aŭtoritatulo.—Ni deziras vian spertan opinion pri tre stranga afero kiu okazis al Sandy ĉe la fiskaptejo lastan nokton. Se vi ne povas ĵeti iom da lumo sur la temon, ne utilas ke alia persono pensu.—La Aŭtoritatulo tiam rakontis la marserpantan tragedion kiel ĝi estis rakontita de maljuna Sandy.

La malgranda ŝipstacieŝtro aŭdis ĉion, ne dirante vorton, kaj ne movante muskolojn, tiam paŝis antaŭen kaj varme premis la manon al la ŝipestro kaj diris:—Mi gratulas vin pro via mirakla eligo de terura mortigo, Singoro. Mi ĵus legis ĉion pri ĝi en la ĵurnalo ĉi tie kaj scivolis kiu estis la boato kiu havis tian mallargan eligon. Mi mem vidis marserpentojn multfoje, sed ne depest mi estis malsaga knabo: kaj neniu el ili estis duone tiel malbela kiel tiu de lasta nokto. Kvardek mejlojn for, ĉu ne? Guste tiel. Nu, mi legos la historieton en la ĵurnalo ĉi tie kaj eble vi akiros indikilon el ĝi.—La nova submarŝipo antaŭ ne longe donacita al Aŭstralio de la imperia registaro kaj kiu estis antaŭe Germana U-boato, kaj la konstruo de kiu estas vualita en mistero, estis provata ĉe Flinders militŝipstacio hieraŭ. Ĉi tiu ŝipo estas tuta novaĵo en marmilita arkitekturo, kaj, inter aliaj novaj trajtoj, estas pelata de elektra povo. La marmilitaj spertuloj, kiuj faris la vojaĝon sur ĉi tiu lasta aldonaĵo al la Aŭstralia militŝiparo, estis pli ol kontentaj je ĝia rapideco kaj

konduto. La rapidecaj provoj estis efektivigatoj sur kurejo etendanta de Kabo Schanek al Kabo Paterson, kaj oni komprenas ke la submarŝipo kovris la distancon je la terurega rapideco de kvardek kvin nodoj. Nenia malfeliĉo okazis ĝis la ŝipo estis tridek naŭ mejlojn nordokcidente de Flinders Marstacio, kiam ĝi subite plungiĝis en amason de nebulo, kaj nur mankis kelkaj futoj kaj ĝi estus tranĉinta fiŝkaptan boaton en duonojn. Ĉi tiu boato ne montris lumojn, kaj—

La restaĵo de la paragrafo estis perditita en la ridado de la aro kiu plenkuguis la lertan manieron per kiu la ŝipstacieŝtro eksplodigis la rakonton pri la marserpento.

Kompatinda Sandy tute konfuzita, devis konfesi ke li eraris, kaj pri la akuzo de manko de lumoj diris:—Ne estas bonsense uzi bonan petrolon en taglumo.

(El "The Age," Melbourne, tradukis P. Wyatt.)

Anglo kiu veturis en rapidira vagonaro kun Amerikano, volis fanfaroni pri la rapideco de la vagonaroj en Anglujo: kaj vidante ke la Amerikano kaŭrigis li diris—Ĉu vi timas pro la rapideco de la vagonaro?—Ne, respondis la Usonano.—Sed tiu ĉi insulo estas tiel malgranda, ke mi timas ke ĝi forlasos la liniojn ĉe la fino.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ĝis la 26 julio ni ricevis la jenajn sumojn:—M. J. Ravelick, 5/-. ĝis majo 24; G. Houston, 4/6, ĝis majo 24; E. D. Nesbet, 9/-. ĝis oktobro 24; M. Junk, 10/-. (ĉesigis); M. Holdensen, 4/6, ĝis aprilo 24; C. M. Pocklington, 4/6, ĝis julio 24; P. T. B. Hudson, 4/6, ĝis julio 24; J. Girdwood, 4/6, ĝis majo 24; S. E. Humplereys, 5/-. ĝis aprilo 24; P. D. Reardon, 4/6, ĝis junio 24; A. Rail, 4/6, ĝis junio 24; L. O'Connor, 4/6, ĝis majo 24; L. S. Payne, 5/-. ĝis junio 24; M. Fraser, 5/-. ĝis majo 25; G. Collingridge, 4/6, ĝis junio 24; H. Robson, 9/-. ĝis majo 24; F. T. Simon, 5/4, ĝis majo 24; R. Kreuz, 5/-. ĝis julio 24; W. D. Smith, 4/6, ĝis majo 24; Sino Wilson, 4/6, ĝis majo 24; H. Conwell, 4/6, ĝis majo 24; R. W. Browning, 5/-. ĝis septembro 24; P. Abbott, 5/-. ĝis majo 24; A. McKenzie 5/-. ĝis julio 24; W. E. Hill, 4/6, ĝis majo 24; H. Hansen, 5/-. ĝis majo 24;

A. Hughes, 4/6, ĝis aŭgusto 24; C. Wendler, 4/6, ĝis junio 23; E. A. Pryke, 4/6, ĝis junio 23; M. Mattinek, 4/6, ĝis junio 24; H. Batchelor, 5/-, ĝis junio 24; V. Irwin, 4/6, ĝis aprilo 24; E. Cox, 4/6, ĝis junio 24; C. L. Clarke, 4/6, ĝis majo 24; N. Gaye, 5/-, ĝis junio 24; F. V. Taylor, 4/6, ĝis majo 24; W. G. H. Williams, 4/6, ĝis aprilo 24; W. V. Boulton, 10/-, ĉesigis; F. Baliček, 5/-, ĝis aŭgusto 24; D. Guilbert, 4/6, ĝis junio 24; K. Simmons, 4/6, ĝis majo 24; E. Heritage, 4/6, ĝis junio 24; T. Middleborough, 4/6, ĝis junio 24; C. Hannaford, 4/6, ĝis junio 24; I. McDonald, 4/6, ĝis julio 24; I. F. Stände, 9/-, ĝis majo 25; C. C. Dornbusch, 4/6, ĝis majo 24; kontantaj, 4/-; reklamo, 12/6; Mont Albert Grupo, £3/1/6.

GARANTIA FUNDO.

T. O'Leary, 10/-; N. L. Byatt, 10/-; G. Mercer, 5/-; M. Fraser, £2/15/-; Sino Wilson, 2/6; H. Conwell, 2/6; M. Martinek, 5/6; G. D. Nash, 5/-.

Ornamaj produktanto serĉas komercan rilaton kun importistoj kaj vendistoj de Gablonz'aj artikloj el vitro kaj metalo. Mi liveras ĉiujn artiklojn, prizorgas enaĉeton kaj informas senpage pri komerco. Rudolf Lang II., Augasse 67, Gablonz a. N., Czecho-Slovakia.

Sro Jozef Konderak, Zarzad Okz, Lasow Paristwowych, urbo Luck, Poland, Europe, deziras interŝanĝi postmarkojn.

PHILLIP ISLAND

The Ideal Tourist Resort.
6 hours from Melbourne by boat and rail.

"Redcliffs," Newhaven.

Accommodation for 50 Guests.
First Class Table.

Good Piano, Spacious Bathrooms, Croquet Lawn, Tennis Court, Good Boating, Fishing, Swimming and Shooting. Picnic Parties Arranged. Esperanto Spoken in the House.

Mr. E. S. BIGELOW, "Redcliffs," NEWHAVEN, PHILLIP ISLAND.

Hall's Book Store

264 CHAPEL STREET
PRAHRAN
(Opposite Town Hall.)

'Phone: Windsor 6081.

Books and Music bought at your home. Libraries Valued.
Specialist in Secondhand School and College Books.
Secondhand Music.

Full Stock of Esperanto Books.

Agent for "LA SUDA KRUCO."

BONAJ DENTOJ

BONA SANO
ONA ODORA SPIRO
ONA RIDO
ONA ASPEKTO

Ĉu vi posedas ĉi tiujn aŭ male?

Ĉiu leganto estas rekomendata al S-ro. E. Hilson por dentistaj servoj ĉe angulo de Glenferrie kaj Barkers Rds., Glenferrie.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— SEND FOR —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers,
Little Collins Street, Melbourne,
by The Imperial Press, 395 Elizabeth Street, Melbourne.